

ANALIZO DE LA LECIONERO «MIRINFANO»

Instrupaŝoj	Tempo (min/s)	Temo	Gramatikaĵo	Rolantoj	Kapabloj	Rimarko
Enkonduka ripeto	00:21-00:36	Kiel mi nomiĝas? Kiu estas mia nomo?	Kiu → nomo	Instruisto-kursanoj	Aŭd-komprena, parola	
	00:48-01:26	El kiu lando mi estas?	El/en kiu lando, ...	Instruisto-kursanoj	Aŭd-komprena, parola	
	01:27-01:54	Kio estas mia profesio?	Kio → profesio	Instruisto-kursanoj	Aŭd-komprena, parola	
Enkonduko de nova ero	01:55-02:58	Lingvaj situacioj enfamilie		Instruisto	Aŭd-komprena	
	03:09-03:27	Ĉu vi parolas la hungaran lingvon?	Hungare, la hungaran lingvon	Instruisto	Aŭd-komprena, gramatika, semantika (leksika)	
	03:28-03:35	Ĉu vi parolas la francan lingvon?	Parolas la -aN -oN	Instruisto-kursanoj	Aŭd-komprena, parola, gramatika, semantika (leksika)	

	03:36-04:24	Kiu parolas la ...-an lingvon?	Parolas la -aN -oN	Instruisto-kursanoj	Aŭd-komprena, parola, gramatika, leksika, semantika (<i>leksika</i>)	Forte, kuraĝe, elegante! → Cseh-metoda elemento
	04:25-04:35	LA litovan lingvon	Konkretaĵo → LA	Instruisto	Gramatika, socilingva (<i>lingvoregistra diferenco</i>)	
	04:36-05:24	Kiu parolas la ...-an lingvon?	Parolas la -aN -oN	Instruisto-kursanoj	Aŭd-komprena, parola, gramatika, leksika, semantika (<i>leksika</i>)	
	05:25-05:36	Kiu parolas esperantE? Aŭ la lingvoN Esperanto?	Parolas -E aŭ la -oN -O	Instruisto	Aŭd-komprena, gramatika, semantika (<i>leksika</i>)	
	05:37-05:46	Mi parolas esperantE.	Parolas -E	Instruisto, poste korusa ripeto	Aŭd-komprena, gramatika, parola, semantika (<i>leksika</i>)	Korusa ripetado → Cseh-metoda elemento

	05:47-06:09	Mi parolas la lingvoN Esperanto.	Parolas la -oN -O	Instruisto, poste korusa ripeto	Aŭd-komprena, gramatika, parola, semantika (leksika)	Korusa ripetado → Cseh-metoda elemento
Klarigo de la ekzerco	06:10-06:30	Ni nun ludas. Venu vi, vi, ...		Instruisto elektas kursanojn	Aŭd-komprena	
	06:32-06:45	Mi estas 20-jara kaj parolas hungare.	Numeroj. Estas x-jara. Parolas -E aŭ la -aN -oN.	Instruisto	Aŭd-komprena	
	06:46-07:25	Mi estas 19-jara kaj parolas la hungaran kaj la francan.	Numeroj. Estas x-jara. Parolas -E aŭ la -aN -oN.	La unua elektita kursano sola	Aŭd-komprena, parola, leksika, gramatika	Ĝusta vicordo dekomence povintus helpi lin. Kaj ankaŭ la uzo de la sama esprim-maniero povintus esti utila por li, kiu havis kelkajn problemetojn pri kompreno.

	07:30-09:44	Mi estas 18-jara, 17-jara, 16-jara, ...	Numeroj. Estas x-jara. Parolas -E aŭ la -aN -oN.	La elektitaj kursanoj unuope, unu post la alia laŭ la donita ekzemplo	Aŭd-komprena, parola, leksika, gramatika	La instruisto ŝanĝas sian lokon por doni klaran vicordon al la kursanoj. La knabineto ĝeniĝas pro la publika korekto de siaj eraroj.
La ekzerco mem	09:45-10:07	Formigo de parolgrupetoj, disdono de folioj		Instruisto helpata de kursanoj	Aŭd-komprena, socilingva (ĝentileco)	Instr.: "Bonvolu por mi." - helpas por la ĝentileca sinesprimo.
	10:08-12:12	La ekzerco "Mirinfano"	Numeroj. Estas x-jara. Parolas -E aŭ la -aN -oN.	Kursanoj grupe, interage	Aŭd-komprena, parola, legada, fonologia, leksika socilingva	
	12:13-12:43	Kontrolo de grupeto		Instruisto	Aŭd-komprena, parola, socilingva	
	12:44-13:07	Ĉesigo de la ekzerco		Instruisto	Aŭd-komprena, socilingva	

	13:08-13:25	Kiel ni nomas la personon, kiu parolas multajn lingvojn?		Instruisto-kursanoj	Aŭd-komprena, socilingva (ĝentileco)	Instr.: "Ni estas poliglotoj." - donas per tio al la kursanoj bonhumoron, kontentiĝon kaj pozitivan lecionerfinon.
--	-------------	--	--	---------------------	--------------------------------------	--

a) je kiu nivelo estis la kursanoj?

Miksita kursanaro, en kiu troviĝis tutkomencantoj, komencintoj, mezniveluloj kaj ankaŭ spion-niveluloj (ĉi-lastaj bone komprenis la ŝercetojn).

b) kiuj kapabloj ne estis evoluigitaj dum tiu lecionero?

- skribado
- ortografiaj kapabloj
- ortofonaj kapabloj
- pluraj semantikaj - kaj socilingvaj kapabloj
- interpretado
- tradukado

c) laŭ kiu metodo estis gvidata tiu ĉi lecionero?

Laŭ rekta metodo kun fojaj Cseh-metodaj elementoj.